

Kio min malhelpas por esti baptita?

Wilfried Plock

Elgermanigis

Vinko Ošlak

Eklezio de evangeliaj kristanoj

Slovenburgo / Slovenj Gradec

2008

La lasta ordono, kiun Jesuo Kristo donis al siaj disĉiploj ĉi tie sur la tero estis: „*Kaj Jesuo venis al ili, kaj diris al ili: Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la tero. Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi*” (Mat 28,18-19). Sed kial en nia popolo troviĝas tiom malmulte da tiaj, kiuj estus baptitaj en la biblia senco de tiu ĉi ordono? En la teksto, kiu sekvas, mi pritraktos la plej oftajn malhelpojn kontraŭ tio. La plej granda kaj vere la plej larĝe disvastigita malhelpo por akcepti la bapton estas:

Unue: la malfido (Agoj 8,36-38)

Iu Etiopano tempumis en Jerusalemo, la plej pia urbo de la mondo. Sed neniu de tie povis montri al li la vojon al la paco en lia koro. Dio devis unue voki evangeliston Filipon el lia benita veklaboro en Samario, por ke la serĉinta idolano povu trovi la vivon en Kristo. Kiam li baldaŭ poste esprimis sian deziron esti baptita, Filipo menciis unu nuran kondiĉon: „*Se vi kredas per via tuta koro...*”

Kara leganto, ĉu vi kredas per via tuta koro? Kredi signifas konfidi. Ĉu vi konfidis vian vivon al Jesuo Kristo? Ĉu vi venis al li kun via kulpo kaj perditeco de via vivo? Ĉu li estas via Savanto kaj via Sinjoro? Ĉu vi vivas kun li en persona rilato? Kaj ĉu vi estas preta fari ĉion, kion li postulas per sia vorto? Se jes, do vi fidas. Antaŭ la biblia fido ĉiam unue okazas la *konvertiĝo*, kaj ĝin sekvas la *obeemo*. La fido estas la sola antaŭkondiĉo por la bapto. Ĝi estas nemalhavebla. El la vidpunkto de Dio la malfido estas la plej grand malhelpo, por ke la homo estu baptita. Tie, kie troviĝas neniu fido, tie ne okazu – ne, tie tute ne devas okazi la bapto. Pro tio bapti bebojn absolute ne havas sencon! Kristo instruas:

„*Kiu kredos kaj estos baptita...*” (Mar 16,16). La kredo estas la kondiĉo.

Kial en nia popolo tiom malmultaj troviĝas por esti baptitaj en la biblia signifo de la vorto? Ĉar la granda malhelpo de la malfido al tiomaj homoj baras la vojon! Ĉu inter la legantoj de tiuj ĉi linioj ankoraŭ troviĝas iu, kiu ne fidas? Se tiel, do mi havas por vi mirindan vorton. Jesuo diras: „*Kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita.*” Tio estas io mirinda! „*Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon*” (Joh 3,16). Sed por vi mi havas ankaŭ forte seriozan vorton. Jesuo avertas: „*Sed kiu ne kredos, tiu estos kondamnita*” (Mar 16,16). Mi petas vin, elektu! Kiun vojon vi volas iri?

Nun do ni parolis pri la unua malhelpo. Dio ne volas, ke la homoj lasu sin bapti sen persona rilato al Li. La plimulton de la homoj do ilia malfido malhelpas. Kaj nun ni venas al la dua grupo: Kio malhelpas ilin?

Due: la sakramentalismo

„Sakramento” signifas la *savsignon, la rimedon, kiu alportas savon, la rimedon de la graco*. La sakramentalismo aperis jam en la komencepoka eklezio. Kiam en la jaro 380 p.Kr. estiĝis la roma imperia eklezio, la spirita vivo rapide dekadencis. La vera, viva sekvoiro post Jesuo retiriĝis favore al la sensuka, distanca kaj dogmista mispieco. Jam en la sama 4-a jarcento la konata eklezia patro Aŭgusteno instruis: „*Kiam la vorto fariĝas por ni elemento, el tio tuj iĝas la sakramento.*” Tio signifas: la pano kaj la vino plus la konsekraj vortoj, ĉio-ĉi donas la sakramenton de la vespermanĝo de la Sinjoro; la akvo plus ordono bapti donas la sakramenton de la bapto. La sakramento fariĝis la idolo de la eklezio.

Faru ni salton en la 20-an jarcenton kaj observu ni la praktikon de baptado en ambaŭ grandaj eklezioj (rom-katolika kaj luter-protestanta, rim. de trad.). La romkatolika eklezio instruas koncerne la bapton sekve:

*„La bapto estas la sakramento, kiu liberigas la homon de heredita kaj persona kulpo, kio lin inkluzivigas en Kriston kaj en lian eklezion. Tio do estas la pordo en novan, transnature vivon. La bapto estas nepra por la savo, la bapto havas kiel konsekvencon forviŝon de la origina peko, de ĉiuj personaj pekoj, kiel ankaŭ de punado de la pekoj, aldone la peradon de la sanktiganta graco, la inkluzivigon en Kriston, la apartenon al la eklezio.”*¹ – Tio, jen, estas la sakramentalismo!

Kaj jen la instruo pri la bapto ĉe la evangelia (luterana – rim. de trad.) eklezio, kiu tekstas simile:

*„La eklezio baptas en la obeemo al la postulo de Kristo. Okaze de la bapto la triunua Dio prenas la homon al si, lin savas de la malbeneco de la peko kaj de la morto, disponigas al li kiel al sia infano ĉiujn bonajn donaĵojn kaj lin inkluzivigas en sian komunecon. Tion ĉi la baptitoj devas ĉiam denove en dankemo kredi kaj atesti en aktiva amo. ... Per la bapto la homo fariĝas la membro de la komunumo de Jesuo. Tial oni baptu infanojn en la preĝejo, plej konvene dum la diservo en la komunumo...”*²

Kara leganto, ankaŭ tio ĉi estas la sakramentalismo! Mi estas certa pri tio, ke la sakramentalismo estas unu el plej grandaj malhelpoj kontraŭ la biblia bapto, kaj por multaj apude ankaŭ spirita blokado kontraŭ la konvertiĝo kaj novnaskiĝo. Kial do iu homo konvertiĝu, se oni ek de lia infanaĝo lin persvadas, ke li pro sia infana bapto jam ĉiukaze estas kristano? Iu benita evangelisto jam en la 19-a jarcento diris tiel: „*En germana lando oni envolvas homajn estaĵojn tuj post ilia naskiĝo en la mortotukon de la instruo pri novnaskiĝo surbaze de beba baptado.*”

¹ Citita el: Neuner-Ross „Der Glaube der Kirche in den Urkunden der Lehrverkündigung“, 11. eldono, p. 362.

² „Kirchliche Lebensordnung“ Die Heilige Taufe, redakto 11.11.83 de evangelia provincklezio en Baden.

Tamen la sakramentalistoj eraras. Ankaŭ Marteno Lutero ĉi-punkte eraris. Li neniam komplete liberiĝis de la katolika sakramentalismo kaj li poste mem falis en ĝian kaptilon. Niatempe la romkatolika eklezio insruas la doktrinon de sep sakramentoj, la novapostola eklezio pri tri, la luter-evangelia pri du – dum la Biblio restas pri unu nura „sakramento”: „*Ĉar la salajro de peko estas morto; sed la donaco de Dio estas eterna vivo en Kristo Jesuo, nia Sinjoro*” (Rom 6,23). Troviĝas do nur unu nura „rimedo de la savo”: tio estas la fido en la Sinjoron Jesuon Kriston.

Kara leganto, ĉu vi koncerne tion ĉi estis false instrukciita? Se tiel, kedu kaj alaŭskultu la Sanktan skribon kaj distanciĝu de la luter-evangelia aŭ romkatolika sakramentalismo! Se vi fidas en la Filon de Dio, lasu vin bapti laŭ la biblia maniero! Kio vin baras por ne esti baptita?

Trie: la tradicialismo

La cirklo de la trafitoj nun plilarĝiĝas. Troviĝas apenaŭ iu, kiu ne plenkreskus kun tia aŭ alia religia tradicio. Jen tiu ĉi venas el la rom-katolika tradicio, tiu alia el la luter-evangelia, tiu tria el libereklezia, iu alia el pietisma fono. Troviĝas sennombro da religiaj tradicioj. Certe ĉiu el ili enhavas ion bonan. Sed ili ĉiuj enhavas ankaŭ la malbonan elementon, nome tie, kie ili devojiĝas de la Sankta skribo. Tial oni devas ĉiujn tradiciojn senescepte enketi surfone de la Dia vorto. Kaj kion instruas pri la bapto la Biblio? Ni faros superrigardon tra la Nova testamento kaj tiel ni konatiĝos sporade per tre grava sinsekvo:

1. VORTO → 2. FIDO → 3. BAPTO → 4. AGOJ

• Mateo 28,18-19: „*Kaj Jesuo venis al ili, kaj diris al ili: Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la tero. Iru do (VORTO) kaj disĉipligu ĉiujn naciojn (FIDO) baptante ilin (BAPTO) en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito instruante ilin observi ĉion, (AGOJ) kion mi ordonis al vi!*“

• Agoj 2,36-42: „*Kun certeco do sciu la tuta domo de Izrael, ke tiun Jesuon, kiun vi krucumis, Dio faris Sinjoro kaj Kristo (VORTO). Tiuj do, kiuj akceptis lian parolon (FIDO), baptiĝis (BAPTO) kaj en tiu tago aldoniĝis ĉirkaŭ tri mil animoj. Kaj ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj (AGOJ).*”

• Agoj 8,5.12: „*Kaj Filipino, malsuprenirinte en la urbon Samario, proklamis al ili la Kriston. (VORTO) Sed kiam ili kredis (FIDO) al Filipino, predikanta la evangelion (AGOJ) pri la regno de Dio kaj la nomo de Jesuo Kristo, ili baptiĝis (BAPTO), viroj kaj virinoj.*“ – Rimarko: Ne estas menciita bapto de beboj!

• Agoj 8,35-40: „Kaj Filipino malfermis sian buŝon, kaj komencante de tiu Skribo, predikis al li Jesuon. (VORTO) Kaj dum ili iris sur la vojo, ili alvenis al iu akvo; kaj la eŭnuko diris: Jen estas akvo; kio malhelpas min baptiĝi? Mi kredas, ke Jesuo Kristo estas la Filo de Dio. (FIDO) Kaj li ordonis, ke la ĉaro haltu, kaj ili ambaŭ malsupreniris en la akvon, Filipino kaj la eŭnuko; kaj li baptis lin. (BAPTO) Kaj li iris sian vojon, ĝojante.“ (AGOJ)

• Agoj 16,14-15: „Kaj unu virino, nomata Lidia, vendistino de purpuro, el la urbo Tiatira, adorantino de Dio, nin aŭdis; ŝian koron la Sinjoro malfermis, por atenti la parolojn (VORTO) de Paŭlo. Kaj kiam ŝi estis baptita (BAPTO), kun sia familio, ŝi nin petegis, dirante: Se vi juĝas min fidela (FIDO) al la Sinjoro, venu, kaj loĝu en mia domo. Kaj ŝi devigis (AGOJ) nin eniri.“

• Agoj 16,30-34: „Sinjoroj, kion mi devas fari, por esti savita? Kaj ili diris (VORTO): KREDU al la Sinjoro Jesuo, kaj vi estos savita, vi kaj via familio (FIDO). Kaj li kondukis ilin en tiu sama nokta horo kaj lavis al ili la batovundojn (AGOJ); kaj baptiĝis (BAPTO) senprokraste li kaj ĉiuj liaj domanoj.“

La ĉi tie menciitaj pensoj unuafoje aperis en la traktaĵo de Balthasar Hubmaier „*Von der christlichen Taufe der Gläubigen*“ (Pri la kristana bapto de la kredantoj), aperinta en la jaro 1525. Hubmaier devis sian baptiĝon pagi per sia vivo. La kristanoj, kiuj tiutempe konis la biblian instruon pri la bapto kaj ĝin praktikis, ofte estis subakvigataj en la sama akvo, en kiu ili baptiĝis, aŭ ili estis – kiel Hubmaier – ŝtipbruligitaj. Al la plej tristaj ĉapitroj de la eklezia historio apartenas la fakto, ke post la apero de la revormacio miloj da kredantoj el la tiel nomita baptisma movado estis mortigitaj de aliaj „kristanoj“.

Kaj kiu nun permesas al ni turni la supre prezentitan sinsekvon de VORTO – FIDO – BAPTO – AGOJ? Charles Haddon Spurgeon diras en sia traktaĵo „La libro de bildoj kaj metaforoj“ tiusence pri domservistino, kiu ricevis ordonon: „*Mariao, balau la akceptoĉambron, fiŝu ĝin per humida ĉifono, poste fiŝu ankaŭ polvon de la tablo, de la seĝoh kaj de la libroj!*“ Kiamaniere reagus la mastro, se la servistino la sinsekvon de tiuj agoj simple turnus surkapen? Tial neniam ignoru la biblian ordon de la aferoj! Se Dio difinas: 1-2-3 – tiam vi ne diru: 3-2-1! La biblia sinsekvo diras: aŭdi – fidi – baptiĝi.

Kaj kio pri la ofte propagandita „modelo de ĉeko“? La reprezentantoj de ĝi certigas: „*Dio en Kristo finis la savon kaj Li enskribas ĝin okaze de la beba bapto en la konton de la infana vivo. Okaze de la konvertiĝo la koncerna homo levas la ĉekon kaj tiel la bapto akiras sian validon.*” Mi agnoskas, homaspekte tio sonas bele. Mi mem bedaŭrinde dum multaj jaroj reprezentis tian rigardon al la afero. Sed kie oni povus tion trovi en la Biblio?

Kaj se vi diras: „*Sed la bapto de la bebo estas tamen tiel bela kutimo...*”
Cipriano jam en la 3-a jarcento post Kristo ekkonis: „*Kutimo sen vero estas per alta aĝo protektita erarpenso.*” Mi petas vin, kara leganto, rompu malnovajn tradiciojn kaj kutimojn kaj surpaŝu la vojon biblian!

Sed la Skribo tamen parolas pri „bapto por la tuta domo”, ĉu ĉi tie ne povus esti enkalkulitaj ankaŭ infanoj kaj beboj? Ni respondu el preciza observado de la ligo inter kvin koncernaj tekstolokoj:

1. **Kornelio kaj lia domo** (Agoj 10): Estis baptita, kiu ricevis Sanktan Spiriton (Agoj 10,47.48). La Sankta Spirito jam antaŭe venis super ĉiujn, kiuj aŭskultis la vorton (10,44). Tio ekskludas etajn infanojn kaj bebojn.

2. **Lidiao kaj ŝia domo** (Agoj 16): La versiklo 40 montras, ke en la domo de Lidiao troviĝis „fratoj”, do homoj kredantaj en Kriston. Kaj ili post tio estis baptitaj.

3. **Prizonestro kaj lia domo** (Agoj 16): Paŭlo kaj Silo predikis la vorton al ĉiuj, kiuj troviĝis en la domo (v. 32). La prizonestro kaj liaj domanoj estis baptitaj (v. 33). Sed post tio oni ekscias, ke la tuta domo ĝojis kun li, ĉar li komencis kredi en Dion. Unue: etaj geknaboj kaj beboj ne havas tian spiritan dispozicion, ke ili povu ĝoji pro la kredo de la prizonestro, eĉ speciale ne en meznokto! Kaj due: ĉiuj, kiuj pro li ĝojis, fariĝis mem kredantoj. Nekredantoj apenaŭ povus ĝoji pro la kredo de iu alia – eĉ speciale en la tempo, kiam la postsekvado de Kristo povis postuli kapon.

4. **Krispo kaj lia domo** (Agoj 18): La versiklo 8 sendube montras, ke ĉiuj loĝantoj de tiu superulo en la sinagogo estis sufiĉe aĝaj por povi kredi, ja ĉiuj tie baptitaj alaŭskultis la vorton.

5. **La familio de Stefano** (1 Kor 1,16): Pri la sama personcirklo en 1 Kor 15,15 estas dirite, ke ili enpaŝis en servon al la Sankta Spirito. Etaj infanoj kaj beboj tion ne povus fari.

Sekve: El la Skribo estas klare evidente, ke ĉiuj-ĉi baptokazoj koncerne tutajn domojn ekskluzive temis pri homoj, kiuj aŭskultis la vorton de Dio kaj tiel povis ekhavi fidon, kiuj ĝojis pri sia savo kaj tuj enpaŝis en la servon de la Sinjoro. Se infanoj estis en ĉeesto, tio signifis, ke ili estis sufiĉe aĝmaturaj por povi akcepti personan decidon. Sed nenie estas skribite, ke iu infano estus portita al sia bapto, ili venis al la bapto mem.

Torej: Iz Pisma je jasno razvidno, da je šlo pri teh krstih celotne hiše izključno za ljudi, ki so poslušali Božjo besedo in lahko verovali, ki so se veselili svoje odrešitve in se takoj postavili v Gospodovo službo. Če so bili otroci pri tem

zraven, potem so bili dovolj stari, da so lahko sprejeli osebno odločitev. Nikjer pa ni zapisano, da bi jih h krstu prinesli, temveč so se sami dali krstiti.

Nu, tio faras grandan diferencon! Kaj ni demandis: Kio min baras por ne baptiĝi?

4. la malobeemo

Estas certe malbone, se ni pri tiuj ĉi aferoj nenion sciis aŭ ni estis kaptitaj en falsa tradicio. Sed se ni pri ĉio-ĉi el la Biblio scias kaj ni tamen ne havas obeemon al la Sinjoro – tio estas la plej malbona kazo.

Multaj kredantoj diras, koncerne la bapton: „Ja ĝi estas ne tiom grava!” Pripensu tamen, ke la bapto estas la ordono de la Sinjoro! Kaj kie temas pri la volo de Dio, tie ne troviĝas negrafaj aferoj. Kaj se vi efektive opinias, ke temas pri bagatelo, do estu fidela, fidela en la bagatelo! Tiu, nome, kiu ne estas fidela en la supoza bagatelo, kiamaniere li estu fidela en granda afero?

Aliaj kristanoj argumentas tiel: „*De mia konvertiĝo jam pasis jaroj aŭ jardekoj. Kial do mi nun baptiĝu?*” Ĉi tie la punkto agnoski sian fidon estus abstraktita. Sed kial vi ne volas en obeemo plenumi la ordonon de Dio? Kaj kial vi ne volas per tio meti la fundamenton por via estonta aŭtenta atestado pri via fido?

Finfine multaj kredantoj diras pri la bapto jene: „Jes mi scias, ke tio estas skribita en la Biblio, sed Dio montru tion al mi persone!” Bone, kiamaniere Dio tion al vi montru? Ĉu ne sufiĉas por vi, ke vi havas alvokon vin bapti kaj multajn ekzemplojn de tiuj, kiuj baptiĝis, en Nova testamento? Ĉu Dio pri aliaj ordonoj same devus doni al vi apartan personan revelacion? Aŭ eventuale temas pri tio, ke en tiu ĉi punkto vi ne volas montri obeemon al Dio?

En la 1-a libro de Samuelo, 15,23, legiĝas skua frazo: „*Ĉar malobeo estas kiel peko de sorĉado, kaj neplenumo estas kiel peko de idolservado.*” Kontraŭstaro al Dio egalas al idolado, ĉar oni tiamaniere starigas sian propran volo super tiu de la Sinjoro. Ĉu vi tion vere tiel volas? En tia kazo via vera dio estas via MI. Aŭ vi tamen volas troviĝi en obeemo al la Sinjoro ankaŭ tiu ĉi-punkte? La obeemo signifas agnoskon de Dia supereco! La obeemo signifas primicon de propra volo, do tiu plej granda afero, kion oni povas oferi al Dio. La tempo, la mono kaj la povo, tion vi povas alporti ankaŭ sub nur parta obeemo. Sed nur la tuteca obeemo kunprenas tutecan benon!

La sinteno de iu matura kristana virino iam tre ĝojigis min. Koncerne la bapton ŝi diris al mi jene: „*Mi povas en mia ĉiutageco nur tre malforte montri al la Sinjoro, ke mi volas Lin obei (en parolo, pensoj ktp.). Sed en tiu ĉi afero mi volontas montras al la Sinjoro mian tutan obeemon.*” Kaj ŝi baptiĝis en sia 60-a

jaraĝo. Ĉu ne volas tiel fari ankaŭ vi? Sinjoro Jesuo instruis siajn disĉiplojn: „*Se vi min amas, vi observos miajn ordonojn*” (Joh 14,15). Mi petas vin, iru post Kristo ankaŭ en tiu ĉi afero, eĉ se la homaj tradicioj kaj opinioj tion kontraŭstaras. Ne timu eventualan perdon de via renomo. La Sinjoro nome diras: „*Kiel vi povas kredi, se vi prenas honorojn inter vi reciproke?*” (Joh 5,44). Ĉu la honoro kaj la renomo ĉe la homoj estas por vi pli gravaj ol la honoro ĉe Dio?

Kio min malhelpas ke mi baptiĝu? Malfido, konfido en supozn sakramenton, pendado ĉe homaj tradicioj aŭ malobeemo en mia koro? Mi petas vin, ne permesu vin daŭre malhelpi! Rigardu la ordonon kaj la ekzemplon de la Sinjoro Jesuo Kristo! Li akceptis bapton de Johano Baptisto. Rigardu la vivon de la apostoloj! Ĉie ili klare atestas por la bapto de la kredantoj per droniĝo. La ekzemplo de la unuaj kristanoj est por vi kuraĝigo, bonvolu paŝi sur la flanko de tiuj, kiuj pli konsideras la vorton de Dio ol homajn tradiciojn. Per via drono vi atestu, ke vi mortis kun Jesuo Kristo kaj ke vi kun li resurektis! Ĉu vi ne volas atesti tiun ĉi mirindan konfeson de la infanoj de Dio? Donu al vi la fidela Sinjoro povon kaj kuraĝon por tiu ĉi paŝo!